# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

http://satesperanto.free.fr/ *** retadreso: satesperanto@free.fr




## NE AL C.P.E.!!!

paĝo 50

Fotoj : Pluraj SAT-anoj

Aprilo 2006 77-a jaro, n-ro 4(1210)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

# Manifestacioj kontraŭ C.P.E. (kontrakto unua dungo) en Francio

## Denove francoj strikas kaj manifestacias

Pluraj centmiloj(*) da civitanoj (precipe studentoj) strikas kaj manifestacias kontraŭ nova leĝo, kies aprobon la registaro (maldemokrate) trudis al la parlamento. La



ĉefa kialo de la malkontento de la protestantoj estas la fakto, ke per tiu novbakita "*CPE*" (*Contrat Première Embauche,* kontrakto por unua dungo, ĉi poste "KUD") la mastroj rajtos laŭplaĉe kaj senklarige maldungi homojn dum la du unuaj jaroj de la kontrakto. Ĝemela frato de la jam disvastigita "*CNE*" (*Contrat Nouvelle Embauche,* Kontrakto por Nova Dungo) destinita al ĉiuj novaj salajruloj de entreprenetoj, la KUD ĉifoje malgarantias decajn laborkondiĉojn al la junuloj ĝis 26-jariĝo.



Fakte ki-am oni rigardas la laborkondiĉojn de la laboristoj el la tuta mondo ĝenerale, oni ja tuj povas konstati ke la francoj estas relative bonŝancaj esti tiel protektataj kompare kun alilandaj laboristoj. "Kial do ili ĉiam invadas stratojn kiam iliaj regantoj kreas novan reformon? Ili ja devus jam ĝui pri siaj privilegioj kaj ĉesi ĝeni la laboron de la regantoj"?

Ĉiam ŝokas min tiaj rimarkoj, ĉar tio signifas ke la homoj ne komprenas kial la francoj ĝuas tiel ne-tro-malbonan sociordon. La respondo al tiu demando kuŝas en tio, ke ili, generacio post generacio, per tiaj rimedoj akiris siajn enviindajn avantaĝojn kaj per similaj rimedoj senĉese devas lukti por konservi ilin kaj sin defendi kontraŭ la sklavigaj "reformoj" de registaro pli kaj pli malkaŝe strebanta plifaciligi la homekspluatadon al la mastroj. Tion mi nomas klasbatalo.

Aparte atentinda estas tiu movado pli kaj pli kreskanta pro tio ke same sindikatistoj kiel salajruloj, studentoj kaj emeritoj unuanime akordiĝas pri la danĝero de tiu reformo kaj kune petas ties nuligon.

Ankaŭ rimarkinda estas la strategio de la registaro kiu trankvile atendas la feriojn (kaj printempon, ja post la pluvo venas suno kiel oni kutimas diri…), t. e. kiam la kuniĝintaj protestaj fortoj disspliĝos ferien.

Mem studento en universitato (pri sportoj), mi havas la eblecon rekte partopreni la movadon kaj observi la sintenojn de diversaj (ne)strikantoj kaj/aŭ (ne)manifestaciantoj. Evidentiĝas post kelka observado, ke ĝenerale nur pro timo por si mem aŭ eventuale ankaŭ por siaj infanoj kaj aliaj parencoj la homoj ekbatalas por defendi la elementajn rajtojn kiujn devus ĝui ĉiu homo, sed neniel pensas "mi luktos solidare kun ĉiuj miaj kamaradoj por defendi la homajn rajtojn".

Plej trafa ekzemplo pri tiu senskrupula egoismo estas miaj universitataj kamaradoj, kiuj kapablas disvolvi kolosan energion por defendi siajn proprajn specifajn celojn (ja ankaŭ la sporta fako de universitato estas sufiĉe malbonfarta… sed tio estas ne la ĉefa temo) kaj obstine rifuzas "droniĝi" en la kontraŭ-KUDan homamason pro timo ke oni ne aŭskultos iliajn specifajn prisportajn protestojn. Despli stulta aperas tiu sinteno kiam oni scias ke:




1) manifestaciante kontraŭ la KUD ili samtempe defendas siajn celojn, ĉar ambaŭ problemoj havas kiel kaŭzon la nehaltigeblan profitavidon de la kapitalista sistemo;

2) meze de la kontraŭ-KUDa manifestacio ili povas multe pli facile kapti la intereson de amasinformiloj ol manifestaciante paralele 10 000-ope dum la aliaj estas 1 000 000…

Kaj fine, kiam mi konscias ke tiuj homoj estas la plej batalemaj kaj la plej bonintencaj el la popolo, mi ne povas ne timi pri nia estonteco…

Aĥ, eĉ junuloj foje maloptimismas! Sed tio estas vana sinteno. Necesas batali ankaŭ por plikonsciigi la plej konsciajn batalantojn.

*Vito Markov*

(*) Manifestacio de la 18a de marto: 500 000 laŭ la oficialaj informoj, 1 500 000 laŭ la organizantoj. Laŭ la ĉiutaga "*L'Humanité*":

Parizo: 350000
Marsejlo: 130000
Bordozo: 55000
*Nantes* (nant):45000
Tuluzo: 45000
*Rennes* (ren): 35000
*Lille* (lil): 30000
Liono: 25000
*Clermont-Ferrand* (klermofera):25000
*Le Mans* (lema): 25000
*Caen* (ka): 20000
Rueno: 20000
Limoĝo: 20000
Montpeliero: 20000
ktp

## El la redaktejo...



*Karaj,*
*vi tenas en la manoj la unuan printempan numeron de Sennaciulo. Kiel vi vidas la printempo en Francio komenciĝas per gravaj socialaj perturboj kaj manifestacioj ĉefe de la junularo. Pri tio vi povas legi sur la paĝo 50. Krom tio vi trovos diversajn aliajn artikolojn kiuj espereble interesos vin.*
*En la marta numero mi invitis vin al la reagoj pri la enhavo kaj aspekto de Sennaciulo, sed ĝis nun venis neniu reago. Mi demandas min ĉu entute iu legas tiun ĉi rubriketon? Eble estus pli bone ke mi ne uzu tiun spacon senutile, se neniu legas ĝin? Ja, mi ŝatus ke tiamaniere la redakcio povu komuniki kun la legantaro, ĉar la utilaj kritikoj kaj proponoj estas ĉiam bonvenaj kaj interesaj. Do, reagu kaj tiamaniere helpu al mi fari interesan kaj SAT-ecan gazeton. Sendu materialon kaj informu SAT-anojn pri la okazaĵoj en viaj regionoj kaj pri la vivo de laboristoj. Venonta numero estu komplete dediĉita al tiu temo. Tio eblos nur se vi kunlaboros.*
*Atendante vian helpon, kamaradece salutas vin, via*

*Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: http://satesperanto.free.fr
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : **satx-s**
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin, Viola, C. Orsingher, Snajpero, I. Moĉilnik kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
❐
Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.



# Komputilo bona - malbona?

En la landoj de Okcidenta Eŭropo komputilo estis en la jaro 1996 uzata dum periodo de 6 jaroj antaŭ ol oni anstataŭis ĝin per nova modelo, pli bona, pli rapida, pli - mi ne scias kia. En la jaro 2005 la vivo de komputilo ĉe la unua posedanto restis nur 2 jarojn kaj tiam ĝi estis anstataŭata de, provinco Guandong, kie troviĝas la centro de elektronika rubodisspeciga entrepreno en Ĉinio. Alia grava centro troviĝas en Dheli, Hindio, kie 25.000 homoj "prilaboras" pli ol 20.000 tunojn da elektronika rubaĵo. 25% de la rubo estas komputiloj.

Naturprotekta asocio "Greenpeace" 



jes pli bona, pli rapida.

En la jaro 2004 vendiĝis entute en la tuta mondo 674 milionoj de porteblaj telefonoj. Evidente ni devas meti grandan demandosignon ĉe la indiko "tuta mondo". La kutima vivodaŭro de portebla telefono eĉ ne plu estas 2 jaroj ĉe la unua posedanto. Ni, la konsumantoj, kreas per ĝi novan formon de rubaĵo, la elektronikan rubaĵon kiu nun jam reprezentas 5 % de la rubaĵo en la mondo, imagu!

Laŭ ciferoj de "Greenpeace", la elektronika rubaĵo triobliĝos dum 5 sekvantaj jaroj pro la evoluo de la "malriĉaj landoj".

Ĉu vi jam faris al vi demandon kien iros via malnova komputilo, portebla telefono, televido, videoaparato, ktp. ktp. Kie troviĝas la monto de elektronika rubaĵo? La respondo estas simpla kaj preskaŭ evidenta, en Azio.

Iu "Bazelo-konvencio" malpermesas transportadon de danĝera rubaĵo el riĉaj landoj al malriĉaj landoj. Inspektado pri tio donis kiel rezulton, kaj tio nur en Eŭropo kie inspektoroj kontrolis 18 havenojn, ke 47% de la rubaĵoj, inter kiuj plejofte elektronikaj rubaĵoj, iras kontraŭleĝe al Aziaj landoj. La celo estas Guiya en la vizitis la plej konatajn lokojn kie oni recikladas kaj malkonstruas la malnovajn elektronikajn aparatojn. Oni prenis specimenojn de la tero kie la reciklado okazas kaj konkludis ke la detrua rezulto por homo kaj tero estas giganta. Ne nur la malkonstruaj terenoj suferas la venenigon pro pezaj metaloj kaj toksaj polveroj, sed ankaŭ la ĉirkaŭaj riveroj kaj subtera akvorezervo estas grave venenigitaj.

Kontrolo ĉe ĉinaj laboristoj hejme montris ke ili kunportas la venenajn polverojn en la vestaĵo al la loĝejo kaj per ĝi malsanigas la loĝantaron en propra domo, la dombestojn kaj plej terure la proprajn familianojn. La ĉiutaga kontakto kun la venena polvero rezultigas negativan efikon al medio kaj homo. La laboristoj malsaniĝas, inter ili ankaŭ multaj infanoj. Nekuracebla damaĝo al la nerva sistemo malsanigas homojn por ĉiam.

Jes granda parto de la elektronika rubaĵo iras la vojon de reciklado, sed ni ĉiuj scias ke eterna reciklado ne eblas kaj ni ankaŭ konas la finan rezulton de tio.

Aziaj landoj libervole akceptas la rubon, kaj jes, estas bona maniero recikladi anstataŭ detrui, sed, reciklado devas okazi en adaptitaj konstruaĵoj aŭ fabrikoj